Lernu kaj ĝuu Esperanton en sunoplena sud-Kalifornio!

NASK

La Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto

28 junio – 16 julio, 2010

ĉe la Universitato de Kalifornio, San Diego UCSD

Instruistoj

Meza nivelo:
Katalin KOVÁTS
Lee MILLER

Supera nivelo:
Grant GOODALL
Orlando RAOLA
Amri WANDEL
Duncan CHARTERS

- ★ bela marborda etoso ĉe mondfama universitato
- ★ tri-semajna intensa lernado de Esperanto
- ★ kvin oficialaj kreditoj de UCSD, uzeblaj por diploma programo
- ★ instruistoj kaj lernantoj el la tuta mondo
- ★ riĉaj vesperaj/semajnfinaj programoj: ludoj, ekskursoj, muziko…
- ★ propra dormoĉambro kaj tri manĝoj tage
- ★ gastprelegantoj kaj internaciaj ekzamenoj
- ★ studu kaj poste iru rekte al la UK en Havano!

Stipendioj haveblas, aparte por instruistoj kaj plentempaj studentoj.

Por pli da informo, vidu: **http://esperanto.org/nask**
Aŭ kontaktu kunordiganton Ellen EDDY, 11736 Scott Creek Drive SW, Olympia WA 98512, USA
(360) 754-4563 • EddyEllen@aol.com

Nord-Amerika Somera Kursaro

28 junio – 16 julio 2010 ĉe la Universitato de Kalifornio (Usono) ĉe San-Diego (UCSD)
Sub la aŭspicio de Esperanto-USA kaj *Esperantic Studies Foundation* (ESF)

Esperanto-USA/ESF stipendioj

Instruistoj kaj studentoj povas ricevi subvencion por parto de la kosto de kurso kaj loĝado. Ni invitas klubojn kaj individuojn rekomendi kandidatojn.

Interesitoj petu aliĝilon de Ellen M. EDDY ĉe <eddyellen@aol.com> aŭ 11736 Scott Creek Drive SW, Olympia WA 98512 USA, 360-754-4563.

Esperanto 5C (meza nivelo)
Instruisto: Lee MILLER <lamiller@centurytel.net>

Ĉi tiu kurso celas studentojn kiuj havas mezan lingvokapablon. La lecionoj emfazos bazan konversacian kapablon, konon de baza lingva strukturo kaj vortprovizo, kaj uzadon de Esperanto en ĉiutagaj interpersonaj renkontiĝoj. La fokuso estos sur la kapablo paroli, kaj kompreni parolan lingvon. Oni studos la lingvon kaj gramatikon de Esperanto kadre de aliaj temoj.

Katalin KOVÁTS <katalin.kovats@gmail.com> estos gastintruisto.

Instruado okazos en Esperanto.

Ĉiu studanto ricevos taksadon de sukceso/malsukceso aŭ literan noton kaj kvin kreditojn uzeblajn en usonaj universitataj studprogramoj.

Esperanto 12 (supera nivelo)
Instruisto: Grant GOODALL <goodall@ling.ucsd.edu>

Ĉi tiu kurso celas spertajn studentojn. Ĉefrolos legaĵoj kaj diskutoj en diversaj fakoj, inkluzive historiajn, sociajn kaj literaturajn aspektojn de Esperanto, kaj altnivelan pritrakton de la strukturo de la lingvo. La gastparolantoj ĉi-jare inkluzivos s-rojn Orlando RAOLA, Amri WANDEL kaj Duncan CHARTERS.

La multfaceta pritrakto aparte utilas por tiuj kiuj volas fortigi sian konon de la lingvo kaj kulturo de Esperanto, kaj por tiuj kiuj pretigas sin por instrui aŭ trapasi altnivelajn ekzamenojn.

Ĉiu studanto ricevos taksadon de sukceso/malsukceso aŭ literan noton kaj kvin kreditojn uzeblajn en usonaj universitataj studprogramoj.

Riĉigaj programeroj

Vesperaj kaj semajnfinaj programeroj diversspecaj donos pliajn eblojn neformale esplori aliajn aspektojn de la Esperantaj lingvo kaj kulturo. Tiuj eventuale inkludos ludojn, grup-kantadon, prikulturajn prelegojn, lumbildajn prezentojn, poeziajn vesperojn, oratoradon, interkulturajn diskutojn, piknikojn kaj ekskursojn. Se vi volus proponi programeron, kontaktu sinjorinon Ellen EDDY.

Registriĝo: usonanoj iru al <**http://summersession.ucsd.edu**> kaj sekvu la paŝojn por *Linguistics/Esperanto 5C* aŭ *Linguistics/Esperanto 12*. Tiuj kiuj venos per turista vizo, petu registrilon de Ellen EDDY ĉe <eddyellen@aol.com>.

Loĝkotizo: sendu ĉekon aŭ bankmandaton por "Schulze Education Endowment" al Ellen EDDY per la supra adreso. Aŭ pagu per kreditkarto ĉe <http://esperantic.org/en/education/nask>. Vidu plian informon ĉe <http://esperanto.org/nask>.